WIKIPEDIA

Maoria lingvo

La **Maoria lingvo** parolata en Nov-Zelando estas unu el la polineziaj lingvoj, kiuj apartenas al la aŭstroneziaj lingvoj.

Nuntempe la Maoria lingvo estas unu el la tri oficialaj lingvoj de Nov-Zelando (la aliaj estas la angla kaj nov-zelanda gestolingvo). Tamen, dum longa tempo, ĝi estis subpremata de la nov-zelanda registaro, estante malpermesita en la lernejoj. Pro tio nuntempe nur 50.000 ĝis 130.000 de la 530.000 maorioj parolas ĝin.

ISO-lingvokodo :

639-1 = mi
639-3 = **mri**

Maoria kulturo kaj lingvo estas instruata en multaj Nov-Zelandaj lernejoj. Aldone, ekzistas antaŭlernejnivelaj «kohanga reo» (lingvejoj) kiuj instruas al «tamariki» (infanoj) tute per la Maoria lingvo.

Maoria	
Te reo Māori	
Parolantoj	157 000 (2 006)
Skribo	latina alfabeto, Māori writing system
Lingvistika klasifiko	
Aŭstronezia lingvaro	
Polinezia lingvaro	
Orienta polinezia lingvaro	
Maoria	
Oficiala statuso	
Oficiala lingvo en	Novzelando
Reguligita de	Komisio por la Lingvo Maoria
Lingva statuso	2 vundebla
Lingvaj kodoj	
Lingvaj kodoj	
ISO 639-1	mi
ISO 639-2	
Bibliografia	mao
Terminologia	mri
ISO 639-3	mri
Glottolog	maor1246
Angla nomo	Māori
Franca nomo	Māori

Enhavo

Origino
Lingviko de la maoria lingvo
Alfabeto kaj prononcado
Tipoj de vortoj
- Bazaj vortoj
  - Substantivoj
    - Ĝeneralaj substantivoj
    - Lokaj substantivoj
    - Personaj substantivoj
    - Pronomoj
  - Agverboj
    - Dudirektaj verboj
    - Perceptaj verboj
    - Netransitivaj verboj
  - Statverboj
  - Modifantoj
- Partikloj
  - Partikloj kiuj antaŭas bazvortojn
    - Artikoloj
    - Aliaj difiniloj
    - Pronomoj
    - Prepozicioj
    - Lokaj prepozicioj
    - Verbaj partikloj
  - Partikloj kiuj sekvas bazvortojn
    - Poziciaj partikloj
    - Direktaj partikloj
    - Adverbaj partikloj
    - Verba partiklo
    - Plurala partiklo
- Vortoj kiuj estas nek bazvortoj nek partikloj
  - Sendependaj vortoj
  - Esprimoj kiuj iam estis vortgrupoj sed nun estas rigardataj neanalizeblaj unuoj
  - Kardinalaj numeraloj
  - Vicmontraj numeraloj
- Pruntado de vortoj el aliaj lingvoj

Sintakso
- Frazelementoj
- Propozicioj
  - Minimumaj frazoj
  - Aktiva formo
  - Por emfazi la aganton
  - Pasiva formo
  - Statverboj
  - Negativaj propozicioj
  - Senverbaj frazoj
  - Ĉu la maoria estas ergativa lingvo?

En Esperanto
Referencoj

Literaturo
Vidu ankaŭ
Eksteraj ligiloj

Origino

La maoria lingvo estas polinezia lingvo, proksime rilata al tiuj de la Kukinsuloj, la insuloj de Franca Polinezio kaj Havajo. Ĝi estas malpli proksima al tiuj de Samoo, Niuo kaj Tongo. Moderna esplorado montras ke la polineziaj lingvoj plej probable devenis de la lingvo de la indiĝenoj de Tajvano. Ĝi ne havis skribitan formon antaŭ proksimume 1840. La maoria lingvo estas oficiala lingvo en Nov-Zelando, kaj ĝi estas uzata de tempo al tempo en kortumoj, la parlamento kaj aliaj oficialaj aferoj.

Lingviko de la maoria lingvo

La unua verko pri la maoria lingvo publikiĝis en 1820.[1] En 1969 Bruce Biggs eldonis sian novan gramatikan teorion kaj simpligis la klasifikon de maoriaj vortoj.[2] La plej ampleksaj priskriboj de la gramatiko de la maoria estas tiuj de Winifred Bauer (1993)[3] kaj (1997)[4] Alia ampleksa lingvika verko estas tiu de Ray Harlow.[5] David Kārena-Holmes prezentis malpli longan priskribon.[6]

Alfabeto kaj prononcado

a, ā, e, ē, h, i, ī, k, m, n, ng, o, ō, p, r, t, u, ū, w, wh

Ĉiuj vokaloj havas mallongan kaj longan formon. Oni indikas la longan per makrono aŭ per duobla litero. La mallongan oni ne markas. La *r* ne estas frikativa, la *p* ne estas ploziva, la *w* estas prononcata kiel en la angla. La digramo *ng* estas unu sono kiun oni prononcas per mola *g* kiel en la norma angla vorto *singer*. La prononco de la digramo *wh* varias iomete laŭ tribo, ĝi estas unu sono, kaj pleje oni prononcas ĝin proksimume kiel *f* en Esperanto. La vokalojn kaj ĉiujn aliajn konsonantojn oni prononcas pli-malpli kiel en Esperanto.

Ekzistas malgrandaj varioj inter la parolado de la diversaj triboj. Ekzemple, maorioj en Sudinsulo prononcas la nomon de Monto Cook *Aoraki*, anstataŭ Aorangi. Ĉiu silabo finiĝas per vokalo. Duoblaj konsonantoj ne okazas. Tial la skribado estas fonetika, se oni uzas la makronojn. Skribitaj duoblaj vokaloj foje estas dubsencaj.

Akcentoj estas malfortaj, tamen duvokalajn silabojn oni emas akcenti iomete, precipe se ili estas la antaŭlasta silabo de vorto. La nuna skribsistemo estiĝis en la 19a jarcento. (misiistoj Kendall kaj Henry Williams, helpataj de Samuel Lee lingvisto) Antaŭe la maoria estis tute parola lingvo. Ĝi ankoraŭ estas ĉefe parolata, kaj oratorado estas ankoraŭ altestimata.

Tipoj de vortoj

La du ĉefaj tipoj de vortoj en la maoria estas bazaj vortoj (substantivoj, agverboj kaj statverboj) kaj partikloj (prepozicioj, artikoloj, posedaj partikloj, verbaj partikloj kaj adverbaj partikloj). Ĉirkaŭ sesdek partikloj ekzistas, kaj miloj da bazaj vortoj. La maoria ofte uzas statverbojn kie aliaj lingvoj uzas adjektivojn. Bazaj vortoj povas modifi aliajn. La modifanto sekvas la modifaton. Ĉiuj agverboj kaj multaj statverboj ankaŭ uzatas kiel substantivoj. Ĉiu propozicio enhavas almenaŭ unu bazan vorton.

Bazaj vortoj

Substantivoj

La tri ĉefaj tipoj de substantivoj estas: ĝeneralaj substantivoj (aĵoj), personaj substantivoj (nomoj de homoj, kaj personaj nomoj de aĵoj), kaj situaj substantivoj (nomoj de lokoj). Oni ankaŭ konsideras la pronomojn subklaso de substantivoj.

La substantivoj ne havas kazojn, kaj ĝenerale ne varias laŭ nombro. Tamen kelkaj oftaj vortoj varias laŭ nombro: ekzemple *tamaiti* (infano) *tamariki* (infanoj). Substantivoj neniam staras sola. Ili ĝenerale havas artikolon aŭ korelativon, tamen substantivoj pri loko ne havas artikolon, ekzemple *runga* (supro), *konei* (ĉi tiu loko), *tai* (la maro).

Ĉiuj substantivoj uzeblas kun difinita artikolo aŭ kun nedifinita artikolo, do mankas distingo inter nombreblaj kaj nenombreblaj substantivoj.

Ĝeneralaj substantivoj

Plejmultaj substantivoj estas membroj de ĉi tiu tipo. Ĝenerala substantivo preskaŭ ĉiam aperas kun determinilo, ekzemple: *ngā manu* = la birdoj.

Lokaj substantivoj

Ĉi tiu klaso enhavas la nomojn de urboj, riveroj, regionoj ktp. Ĝi ankaŭ enhavas la vortojn kiuj nomas lokon relative al objekto. Ekzemple: [7]

- *konei, konā, korā* = ĉi tie, tie apud vi, tie for
- *mua* = la antaŭo (aŭ space aŭ tempe)
- *muri* = la malantaŭo, la posta;
- *runga* = la supro, la sudo
- *raro* = la malsupro, la nordo
- *roto* = la interno
- *waho* = la ekstero

Por la prepozicioj en Esperanto, oni uzas ekzemple:

- *kei rungi i te tēpu* = ĉe la supro de la tablo = sur la tablo
- *i roto i te kāri* = ĉe la interno de la ĝardeno = en la ĝardeno

Personaj substantivoj

La nomoj de homoj, triboj, kanuoj, monatoj, personaj pronomoj, kaj la demanda pronomo *wai* = kiu(j), kiun oni uzas por demando por kiu la atendata respondo estas persona nomo.

Pronomoj

La personaj pronomoj nur estas uzataj pri homoj. Ili ne havas genrojn, sed apud singularo kaj pluralo ekzistas dualaj formoj. Krome estas ĉe "ni" distingo inter inkluda kaj ekskluda formoj.[8]



Pronomoj en la maoria

Simplaj pronomoj

Persono	Singularo	Dualo	Pluralo
1-a	au	tāua (inkl.) māua (ekskl.)	tātou (inkl.) mātou (ekskl.)
2-a	koe	kōrua	koutou
3-a	ia	rāua	rātou

Post prepozicioj je fina -ā kaj -ō (mā, mō "por", nā, nō "de", ā, ō "de") la singularaj pronomoj havas apartajn formojn, kiuj ankaŭ estas uzataj ĉe posesivaj pronomoj.[9]

Apartaj formoj

Persono	Pronomo	Ekzemplo 1	Traduko 1	Ekzemplo 2	Traduko 2
1-a	-ku	mōku, māku	por mi	tōku, tāku; ōku, āku	mia; miaj
2-a	-u	nāu	de ci, de vi	tōu, tāu; ōu, āu	via; viaj
3-a	-na	ōna	de li, de ŝi	tōna, tāna; ōna, āna	lia, ŝia; liaj, ŝiaj

Agverboj

La agverboj nomas agojn. Ili troviĝas en verbaj vortgrupoj kun verbaj partikloj. Plejmultaj agverboj estas pasivigeblaj. Oni konsideras ilin transitivaj. Ĉi tiuj (pasivigeblaj verboj) uziĝas en tri specoj de propozicio:

- *Kei te patu ia i tana kurī* = Batas li/ŝi je sia hundo (aktiva, objekto markita per *i*)
- *Kei te patua e ia tana kurī* = Batatas de li/ŝi lia/ŝia hundo (pasiva, aganto markita per *e*)
- *Nāna tana kurī i patu* = De li lia/ŝia hundo batis

Dudirektaj verboj

Wennergren nomas ilin "verboj kun al-komplemento"[10]. Ekzemple: doni, lavi, ŝteli, aparteni, pagi. Harlow skribis[11]:

malmultaj verboj, kies signifo temas pri ia "transigo", ekzemple doni, montri, rakonti, havas du objektojn: unu, la rekta objekto, por la afero transigata, kaj la alia, la tiel nomata malrekta objekto, por la homo al kiu la rekta objekto estas transigata. Ekzemple:

- *I whakamārama te kaiako i te rapanga ki ngā tamariki* = Klarigis la instruisto je la problemo al la infanoj
- *E whakakite ana ia i ana kete ki ngā manuhiri* = Montras ŝi/li je siaj korboj al la vizitantoj (p 110)
- *Hoatu tētahi āporo ki tō hoa* = Donu unu pomon al via amiko[12]

Tamen la uzado estas malregula. En la suba citaĵo la infanoj estas la objekto kaj la transigata studobjekto estas la al-komplemento:

- *Kua whakawhiwhi te Whare Wānanga i ngā ākonga ki ā rātou tohu mātauranga* = Aljuĝis la Universitato siajn studentojn al iliaj diplomoj[12]
- *Utua ai au e rima herengi i te wiki* = Pagatis mi je kvin ŝilingoj en ĉiu semajno* (malbona esprimo en Esperanto)[12]

Perceptaj verboj

Perceptaj verboj estas subklaso de agverboj kaj pasivigeblaj. (En Esperanto tiaj verboj estas normalaj agverboj.) Ĉar ili temas pri mensa stato aŭ percepto, la entoj estas la perceptanto (subjekto) kaj la perceptato (objekto). La ĉefaj verboj en ĉi tiu subklaso estas: *rongo* (aŭdi), *pīrangi* (deziri, bezoni), *hiahia* (deziri, voli), *mōhio* (scii, koni), *mahara* (pripensi, memori), *tūmanako* (esperi). Ĝenerale, la objekto de percepta verbo estas markita per *ki*. La verbo *kite* (vidi) estas escepto, ĉar ĝia objekto estas markita per *i*, same al ĝeneralaj agverboj (supre). Ekzemple:

- *Kei te mōhio ki a Ngāhuia?* = [Ĉu] konas [vi] al Ngāhuia?
- *I kite te tangata i te kurī* = Vidis la homo je la hundo

Netransitivaj verboj

Agverboj kiuj ĝenerale ne havas objekton en la kutima senco. Oftaj ekzemploj temas pri movado: *haere* (iri), *moe* (dormi), *oma* (kuri), *takoto* (kuŝi), *tū* (stari). Tamen "Māori Dictionary" listigas pasivan formon por ĉiu el tiuj verboj krom ' moe'.[12] La celo de movado estas markita per 'ki' kaj la origino per 'i'. Ekzemple:

- *I haere ia i te whare ki te toa* = Iris li/ŝi de la domo al la butiko

Statverboj

La statverboj estas malgranda aro de verboj kiuj temas pri stato anstataŭ ago. Ili ne havas pasivon. La stato kutime estas la rezulto de ago. Se la aginto estas menciita, tiu estas notita en vortgrupo markita per *i*.[13] Unu speco de statverbo estas uzebla kie en aliaj lingvoj oni uzas la verbon "esti" kaj adjektivon. Ekzemple:

- *Ka pai ngā kai* = Bonas la manĝaĵoj = Estas bonaj la manĝaĵoj

Evidente *pai* estas verbo ĉar ĝi troviĝas kun *ka* (verba partiklo) en verba vortgrupo (*ka pai*). La alia speco de statverboj estas uzata kie iuj aliaj lingvoj uzas participon aŭ medialan verbon. La aganto de la origina verbo estas la paciento de la statverbo. La signifo de tia verbo estas kvazaŭ pasiva. Ekzemple:

- *I pakaru te wini i a Huri* = Estas rompita la fenestro de Huri = Rompiĝis la fenestro pro Huri
- *I mahue ia i te pahi* = Estas lasita li/ŝi de la buso
- *Kua mutu te kura* = Estas finita la lernejo = Finiĝis la lernejo

Karena-Holmes skribis ke kiam statverbo estas uzata kun la nedifina artikolo, *he*, oni povas konsideri ke la vortgrupo havas verban senson.[14] Ekzemple:

- *He whero te whare* = Ruĝas la domo.
- *He rangatira a Rewi* = Estimatas Rewi = Rewi estas ĉefo (Substantivo estas pli taŭga traduko).

Harlow konsideras ke la uzado de bazvortoj kun la artikolo *he* montras ke la sekva vorto estas substantivo aŭ adjektivo. Tamen li ankoraŭ traktas vortgrupon kun *he* kiel predikaton (sube Predikato).[15]

Iuj verboj ekzistas en identaj aŭ rilataj formoj kiel kaj statverbo kaj agverbo. Ekzemple: *pai* kiel statverbo signifas "boni", kaj *pai* kiel agverbo signifas "ŝati" kaj havas pasivon *paingia*. Plejmultaj statverboj estas uzeblaj kiel substantivoj, ekzemple: *pai* (statverbo) = boni, *pai* (substantivo) = boneco.

Modifantoj

Karena-Holmes[16] skribis ke ne ekzistas vortklaso simila al la anglaj adjektivoj. Tamen certe troviĝas vortoj kiuj estas uzeblaj kiel adjektivoj, t.e. por modifi substantivon. Plejmultaj maoriaj bazvortoj estas uzeblaj tiel. Modifanto kutime sekvas la vorton kiun ĝi modifas. Ekzemple:

- *he whare kōwhatu* = domo ŝtona (substantivo kiel modifanto)
- *he whare kai* = domo manĝada (agverbo kiel modifanto)
- *he whare pai* = domo bona (statverbo kiel modifanto)

Ĉiu modifanto de la sama substantivo bezonas apartan vortgrupon, ekzemple:

- *he whare pai* | *he nui hoki* = domo bona | granda ankaŭ "bona, granda domo"

Tamen, bazvorto povas modifi vortgrupon, ekzemple:

- *te otaota whai purapura* = herbo posedo semo "semportanta herbo"

Bazvorto ankaŭ povas modifi verbon, do agi kiel adverbo.

Partikloj

Partikloj kiuj antaŭas bazvortojn

Artikoloj

- *te* singulara difina artikolo, *te whare* = la domo
- *ngā* plurala difina artikolo, *ngā whare* = la domoj
- *he* maldifina artikolo, *he whare* = iu(j) domo(j). *He* ne difinas nombron, do *he whare* estas tradukebla kiel: domo, domoj, iuj domoj, laŭ kunteksto.
- *a* persona artikolo, indikas personon, *i haere a Huri* = iris Huri. Ĉi tiu artikolo estas uzata antaŭ personaj substantivoj, personaj pronomoj (krom *ahau*), kaj lokaj substantivoj.

Aliaj difiniloj

Oni kombinas la difinan artikolon kun la poziciaj partikloj (vidu sube) por formi difinilojn:

Difiniloj

Singularo	Pluralo
tēnei = ĉi tiu	*ēnei* = ĉi tiuj
tēnā = tiu (apud la alparolato)	*ēnā* = tiuj (apud la alparolato)
tērā = tiu (fora)	*ērā* = tiuj (foraj)
tētahi = unu, iu	*ētahi* = iuj
taua = tiu (menciita)	*aua* = tiuj (menciitaj)
tēhea...? = kiu...?	*ēhea... ?* = kiuj... ?

Ekzemple: *te manu nei* = *tēnei manu* = ĉi tiu birdo.

Pronomoj

La difiniloj en la antaŭa sekcio estas ankaŭ uzeblaj kiel pronomoj (bazvortoj), ekzemple:

- *Ko tēnei te whare* = ĉi tiu estas la domo

Prepozicioj

- *ko, me* = kaj
- *me* = se
- *a* = de
- *o, nā, nō, mā, mō, i, e* = de
- *a* (futura)
- *e* (alparolo)

Lokaj prepozicioj

- *Ki* temas pri moviĝo aŭ ia mensa transigo de ie al ie alia: *ki konei* = al ĉi tiu loko

kei (aŭ *kai*), *i*, *hei* (aŭ *hai*) estas prepozicioj kun tenso. Ili indikas "ĉe" en la tri tensoj:

- *kei* = ĉe aktuale; *kei te whare ia* = ĉeas la domo li/ŝi
- *i* = ĉe pasintece; *i te whare ia* = ĉeis la domo li/ŝi
- *hei* = ĉe estonte; *hei te whare ia* = ĉeos la domo li/ŝi

Mankas verbo kiu signifas "havi" en la maoria, do uzi la lokajn prepoziciojn estas unu rimedo montri posedadon.

- *Kei a Huri te pukapuka* = Ĉeas Huri la libro = La libro estas ĉe Huri = Huri havas la libron

Verbaj partikloj

Bauer nomas ilin TAM-markiloj (tenso-aspekto-modo).[17] Ĉiu verba partiklo havas po unu, aŭ du aŭ tri el tiuj atributoj. Ĉi tie menciataj estas nur la ĉefaj uzoj de la verbaj partikloj.[18][12]

- *i*: la ago de la sekva verbo okazis pasintece, ekzemple, *i haere a Huri* = iris Huri
- *kua*: ago estas farita aŭ farota, ekzemple, *kua haere a Huri* = iris Huri; stato estas atingita, ekzemple, *kua tūreiti ia* = malfruiĝis li/ŝi
- *ka*: nova ago aŭ stato, ofte futura, ekzemple, *ka haere tātou* = iru ni
- *e*: futura ago, ekzemple, *tērā pea e tae mai ia* = eble alvenos li/ŝi; kun *ana* post la verbo por daŭra ago aŭ stato, ekzemple **e pai ana au* = bonsana estas mi
- *kia*: dezirata ago aŭ stato, ekzemple, *kia tūpato* = estu zorgema
- *me*: devus fari agon, ekzemple, *me haere tātou* = devus iri ni
- *kei*: evitu agon aŭ staton, ekzemple, *kei hinga koe* = ne falu
- *ina*: se kaj kiam ago okazas, ekzemple, *ina haere koe* = kiam iros vi

Partikloj kiuj sekvas bazvortojn

Poziciaj partikloj

- *nei* = ĉi tie (apud la parolanto)
- *na* = tie (apud la alparolato)
- *ra* = tie (for)

ekzemple, *ngā manu ra* = la birdoj for

El tiuj poziciaj partikloj oni formis la difinilojn:

- *konei* = ĉi tiu loko
- *konā* = tiu loko apud la alparolato
- *korā* = tiu fora loko

Eblas ankaŭ kombini ilin kun *pē* por fari agverbojn:

- *pēnei* = fari ĉi tiel
- *pēnā* = fari tiel (kiel la alparolato)
- *pērā* = fari tiel (kiel fora iu)

Direktaj partikloj

- *mai* = ĉi tien (al la parolanto)
- *atu* = tien, foren
- *ake* = supren
- *iho* = malsupren

Adverbaj partikloj

ai anake anō hoki kau kē koa noa pea rawa tonu

Verba partiklo

ana sekvas *e* kaj bazvorton por indiki daŭran agon aŭ staton

Plurala partiklo

- *mā* = kaj kunuloj, plus

ekzemple, *ko Hata mā* = Hata kaj liaj kunuloj

- *e hoa mā* = amikoj
- *tekau mā tahi* = dek plus unu, t.e. dek unu

Vortoj kiuj estas nek bazvortoj nek partikloj

Sendependaj vortoj

Ekzemple:

- *ā* = kaj (kunligas propoziciojn aŭ frazelementojn)
- *āe* = jes
- *kāo, ehē* = ne
- *arā* = tio estas (enkondukas klarigon)
- *anei, anā, arā* = ĉi tie, tie, tie for

Esprimoj kiuj iam estis vortgrupoj sed nun estas rigardataj neanalizeblaj unuoj

Ekzemple[19]:

- *kātahi* = kaj tiam, ĵus
- *kaore, ehara* = ne
- *engari* = sed
- *mehemea* = se

Kardinalaj numeraloj

Numeraloj en la maoria pli similas al statverboj ol adjektivoj, sed ili havas specialajn formojn. Ili signifas proksimume 'esti du, kvar ktp nombre'. Numeraloj kutime sekvas verban partiklon. Krom kelkaj esceptoj, numeraloj ne staras antaŭ substantivoj kiel en Esperanto. Ekzemple:[20]

- *Ēnei whare e rua* = Ĉi tiuj du domoj
- *E rua ngā whare kei roto i tēnei rori* = Du estas la domoj en ĉi tiu strato = Estas du domoj en ĉi tiu strato
- *Ka whā tau au ki reira* = Kvar jarojn estos mi tie = Mi estos tie kvar jarojn

La numeraloj estas: *tahi* (1), *rua* (2), *toru* (3), *whā* (4), *rima* (5), *ono* (6), *whitu* (7), *waru* (8), *iwa* (9), *tekau* (10), *tekau mā tahi* (11), *tekau mā rua* (12), *rua tekau* (20), *rau* (100), *e rua rau* (200), *kotahi mano* (1000), *miriona* (1000000). Ordaj numeraloj estas: *tuatahi* aŭ *te tahi* (1a), *te tekau* (10a), *te tekau mā tahi* (11a), *te rua tekau* (20a), *te rau* (100a) ktp. Por multipliki, apudmetu la numerojn sen ia ligvorto: *rua tekau rima* (20 x 5).

Vicmontraj numeraloj

La vicmontraj numeraloj 'unua' ĝis 'naŭa' formiĝas per la prefikso *tua-*: *tuatahi* (unua), *tuarua* (dua)... Ĉi tiuj vortoj estas adjektivoj. Ili aŭ sekvas la ĉefan bazvorton kiun ili modifas, aŭ sekvas la partiklon 'te' en aparta vortgrupo (adjekto), ekzemple:

- *Te tuatahi o ngā whare* = La unua el la domoj = La unua domo

Por la numeraloj ek de 'deka', la prefikso *tua-* ne uzatas. La vicnumeraloj ek de 'deka' estas samaj al la kardinalaj numeraloj sen verba partiklo, ekzemple:

- *Te tekau o ngā rā o Tīhema* = La deka el la tagoj de Decembro = La deka de Decembro

La sama formo iam uzatas por 'dua' ĝis 'naŭa', precipe por datoj.[21]

Pruntado de vortoj el aliaj lingvoj

La maoria lingvo prenis vortojn el aliaj lingvoj. Ili devis ricevi la ortografion de la maoria lingvo. Ĉar ĝi havas nur dek konsonantajn sonojn, kompreneble la prononcado ofte estas malsimila al la vorto en ties origina lingvo. Ekzemploj:

> *hipi* (ŝafo, el *sheep*)
> *hoiho* (ĉevalo, el *horse*)
> *Wiwi* (franca, franco, el *oui oui*)

Ĉiam estas diversaj opinioj pri ĉu adopti neologismon aŭ uzi jam ekzistantajn vortojn. Ekzemple:

motokā (aŭtomobilo, el *motor car*) anstataŭ *waka* (kanuo, veturilo)

Sintakso

Frazelementoj

Frazoj kaj propozicioj konsistas el vortgrupoj kiujn oni konsideras frazelementoj. En la maoria, frazelementoj estas la naturaj dividaĵoj de parolado, kaj eventualaj paŭzoj normale okazas inter frazelementoj. En diversaj konstruaĵoj kiuj estas reordigeblaj en la frazo, ĉiam estas tutaj frazelementoj, ne unuopaj vortoj, kiujn oni reordigas.[22]

La tri tipoj de frazelementoj estas: predikataj, substantivaj kaj prepoziciaj.[23]

Karena-Holmes skribis pri frazelementoj[24]: Preskaŭ ĉiu frazelemento en la maoria enhavas almenaŭ unu bazvorton, kiu portas la ĉefan signifon de la frazelemento. Iufoje frazelemento konsistas sole el bazvorto. Pli ofte, la bazvorto(j) havas partiklojn antaŭe, aŭ poste, aŭ en ambaŭ lokoj. La verbo, subjekto, objekto kaj adjektoj troviĝas en apartaj frazelementoj. Propozicio kun aktiva agverbo ofte havas la ordon: VSO (verbo subjekto objekto). Malpli oftaj formoj havas la ordon SVO. Harlow nomas la prepoziciajn frazelementojn (kaj objektojn kaj adjektojn) komentoj.[25]

Propozicioj

En la ekzemploj troviĝas oblikvo inter la frazelementoj.

Minimumaj frazoj

La minimuma frazo konsistas el unu verba frazelemento, ekzemple:

kei te ua = pluvas
ka ahiahi = vesperiĝis
titiro! = rigardu!

Aktiva formo

ka aroha / au / ki a koe = amas / mi / je vi = mi amas vin
ka waiata / te kōtiro / i te waiata = kantas / la knabino / je la kanto = la knabino kantas la kanton
i patu / ia / i te paoro = batis / li / je la pilko = li batis la pilkon
kei te patu / ia / i tāna kurī = batas / ŝi / je sia hundo = ŝi batas sian hundon

Post irverboj *ki* signifas "al" kaj *i* signifas "de".

i haere / a Hone / i te whare / ki te toa = iris / Johano / de la domo / al la butiko = Johano iris de la domo al la butiko

En pasiva formo, kiu povas enhavi la finaĵon -*a* (en la ekzemplo) aŭ -*tia*:

kei te patua / e ia / tāna kurī = batatas / de ŝi / ŝia hundo = ŝia hundo estas bata de ŝi

Por emfazi la aganton

Se oni volas emfazi la subjekton, oni povas meti ĝin komence.

ko Hine / i whāngai / i te tamaiti = ja Hine / manĝigis / je la infano
nāna / tana kurī / i patu = ja / ŝia hundo /batatas
nā mātou / i hanga / te whare = ja ni / konstruis / la domon

Pasiva formo

ka arohaina / te kōtiro / e te tamaiti = amatas / la knabino / de la infano

Por pasivigi verbon oni aldonas sufikson al ĝi. Tiuj sufiksoj (-*tia*, -*ria*, -*ia*, -*ngia*, -*ina*) varias laŭ la verbo, kaj oni devas parkeri ilin. Ekzemple:

e kimi ana te tangata i te kurī = serĉas la viro je la hundo
e kimihia ana te kurī e te tangata = serĉatas la hundo de la viro

La pasiva formo uzatas pli ofte ol en Esperanto. La imperativo de transitivaj verboj kutime estas pasiva.

takahia / te ngārara = piedprematu / la insekto-aŭ-rampulo
tangohia / ō hū = demetatu / viaj ŝuoj

Statverboj

Statverboj ne havas pasivon.

ka pai / te kai = bonas / la manĝaĵo
ka ora / te wahine / i te rongoa = saniĝas / la virino / per la medikamento

Negativaj propozicioj

Negativa esprimo komence, kaj SVO.

kīhai / a Mere / i whangai / i te tamaiti = ne / Mere / manĝigis / je la infano

Senverbaj frazoj

Bauer komentis ke la maoria havas frazojn kun verboj kaj frazojn sen verboj, ĉar ĝi ne havas kopulajn verbojn.[26] Multaj senverbaj frazoj estas ekvaciaj frazoj. Tiaj frazoj okazas en Esperanto kaj en iuj aliaj lingvoj [27], ekzemple:

- Jen kelkaj konstatoj el tiu raporto.CorpusEye (https://corp.hum.sdu.dk/cgi-bin/cqp.cgi?utf8=%E2%9C%93&lang=eo&corpus=ESP_MONATO&corpus=ESP_EVENTOJ&corpus=ESP_WIKI_2010&search=jen&type=basic_search&case=insensitive&Action=Search&password=). Alirita 2018-01-12.
- Ju pli da konkretaj proponoj, des pli da ebloj solvi problemon.CorpusEye (https://corp.hum.sdu.dk/cgi-bin/cqp.cgi?utf8=%E2%9C%93&lang=eo&corpus=ESP_MONATO&corpus=ESP_EVENTOJ&corpus=ESP_WIKI_2010&search=ju+pli&type=basic_search&case=insensitive&Action=Search&password=). Alirita 2018-01-12.
- Glora la celo, sankta l'afero.[28]

Tamen ekvaciaj frazoj estas pli oftaj en la maoria. Bauer donas ĉi tiujn ekzemplojn de senverbaj frazoj:

- *Ko te pahi / o te kura / tēnei* = la buso | de la lernejo | ĉi tiu = ĉi tiu estas la buso de la lernejo
- *He tino kino / tēnei pahi = tre malbona* | ĉi tiu buso = ĉi tiu buso estas tre malbona
- *Kei roto / ngā tamariki / i te whare kura* = ĉeas interno | la infanoj | de la lernejo = la infanoj estas en la lernejo

Bauer nomas la partiklon *ko* ekvacia predikata prepozicio. Ĝi ne havas ekvivalenton en Esperanto.

Ĉu la maoria estas ergativa lingvo?

Iuj polineziaj lingvoj (ekzemple la samoa lingvo) elmontras trajtojn de ergativa sistemo, dum aliaj havas nur malmultajn ergativajn trajtojn. Lingvikistoj argumentas pri ĉu polineziaj lingvoj estis ĉiuj origine ergativaj laŭ markado aŭ ĉu la ergativa markado estas nova elvoluaĵo ĉe iuj el ili.[29] En ergativa-absoluta (E-A) sistemo, la paciento estas la subjekto de transitiva frazo. La verbo ne havas pasivan formon. En nominativa-akuzativa (N-A) sistemo, la paciento povas esti la subjekto nur de pasiva verbo.[30] Eble ergativaj spuroj en la maoria:[31]

- *me, he mea*, agantoemfazaj frazoj, neŭtraj verboj (statverboj)

Bauer konsideras ke ekzistas mulmulta pruvo de ergativaj ŝablonoj en la maoria. Ĝi estas grandparte nominativa-akuzativa. La supre menciitaj konstruaĵoj estas raraj.[32]

Sinclair (1976) studis la demandon: ĉu la maoria estas ergativa lingvo? Ĉar kutimaj metodoj por distingi ergativajn formojn ne uzeblas ĉe la maoria, la argumento reduktiĝis al: kiu modelo (E-A aŭ N-A) klarigas pli multajn trajtojn de la lingvo. Li konkludis ke la E-A hipotezo ĝustigas la oftecon kaj naturecon de la frazformo tradicie nomita pasiva. La N-A hipotezo antaŭvidas ke la formo tradicie nomata aktiva estu plej ofta, sed ĝi ne estas tute akceptata. Ke la pli markita formo estas konsiderata pli baza, estas malforteco en la E-A modelo de la maoria.[33]

Harlow notas ke se la objekto de transitiva verbo estas kutime markata per *i*, la verbo devas esti pasiva kaj la t.n. objekto fariĝas la subjekto, ekzemple:[34]

- *kimihia he tikanga!* = serĉatu vojo! = serĉu vojon!

Tiaj frazoj ofte estas tradukataj en aktivan formon de la cellingvo. Escepto estas por la refleksivaj verboj, ekzemple:

- *horoi i a koutou!* = lavu je vi! = lavu vin!

En Esperanto

La revuo "Kuriero" de Unesko dediĉis sian numeron n-ro 1 de januaro-marto 2019 al la temo de indiĝenaj lingvoj okaze de la proklamo de 2019 kiel Internacia Jaro de Indiĝenaj Lingvoj.[35] Tiukadre la artikolo *La umbilika ŝnuro*, de Kirituia Tumarae-Teka kaj James Doherty, temas pri la konceptoj inter maorioj pri la rilato al la medio.[36]

Referencoj

1. ↑ A Grammar and Vocabulary of the Language of New Zealand, Church Missionary Society, England, 1820
2. ↑ Let's Learn Maori, Bruce Biggs, Reed,1969
3. ↑ Bauer, 1993
4. ↑ Bauer, 1997
5. ↑ Harlow, 2015
6. ↑ Kārena-Holmes, 1995
7. ↑ Kārena-Holmes, 1995, paĝoj 36-8
8. ↑ Kauderwelsch 216, paĝo 26
9. ↑ Kauderwelsch 216, paĝoj 27-29
10. ↑ https://bertilow.com/pmeg/indekso/index.html Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko, Bertilo Wennergren
11. ↑ Harlow, 2015, paĝo 148
12. ↑ 12,0 12,1 12,2 12,3 12,4 http://maoridictionary.co.nz/ Māori Dictionary
13. ↑ Harlow, 2015, paĝo 69
14. ↑ Kārena-Holmes, 1995, paĝo 88
15. ↑ Harlow, 2015, paĝo 132
16. ↑ Kārena-Holmes, 1995, paĝo 87
17. ↑ Bauer, 1997

18. ↑ Kārena-Holmes, 1995, paĝo 95-6
19. ↑ Harlow, 2015, paĝo 35
20. ↑ Harlow, 2015, paĝo 254
21. ↑ Harlow, 2015, paĝo 259
22. ↑ Harlow, 2015, paĝo 16
23. ↑ Harlow, 2015, paĝo 96
24. ↑ Kārena-Holmes, 1995, paĝo 6
25. ↑ Harlow, 2015, paĝo 137
26. ↑ https://web.stanford.edu/group/cslipublications/cslipublications/LFG/9/pdfs/lfg04bauer.pdf Actor-emphatic sentences in Māori, Winifred Bauer, Proceedings of the LFG04 Conference, 2004
27. ↑ https://en.wikipedia.org/wiki/Nominal_sentence
28. ↑ PAG, 1980, paĝo 233
29. ↑ Bauer, 1997, paĝo 533
30. ↑ Bauer, 1997, paĝo 535
31. ↑ Bauer, 1997, paĝo 536
32. ↑ Bauer, 1997, paĝo 538
33. ↑ Is Maori an Ergative Language? M B W Sinclair, in The Journal of the Polynesian Society, Vol 85, No 1, March 1976, pp 3-26, http://www.jps.auckland.ac.nz/document/Volume_85_1976/volume_85%2C_No._1/Is_Maori_an_ergative_language%2C_by_M._B._W._Sinclair%26/p1?page=0&action=searchresult&target=
34. ↑ Harlow, 2010, paĝo 195
35. ↑ "Kuriero" de Unesko, n-ro 1 de januaro-marto 2019, ISSN 2521-7356 60 paĝoj.
36. ↑ *La umbilika ŝnuro*, Kirituia Tumarae-Teka kaj James Doherty, "Kuriero" de Unesko, n-ro 1 de januaro-marto 2019, paĝo 23.

Literaturo

- Winifred Bauer. (1993) *Maori*. ISBN 978-0-415-59999-3., angle
- Winifred Bauer. (1997) *The Reed Reference Grammar of Māori*. ISBN 0790005301., angle
- Ray Harlow. (2015) *A Māori Reference Grammar*. ISBN 978-1-77550-203-6., angle
- K. Kalocsay kaj G. Waringhien. (1980) *Plena Analiza Gramatiko de Esperanto*. ISBN 92-9017-022-0.,
- David Kārena-Holmes. (1995) *Māori Language - Understanding the Grammar*. ISBN 1-877139-00-0., angle
- John C. Moorfield. (2003-2018) *Te Aka Online Māori Dictionary*.}
- Haupai Puke, Ray Harlow. (2008) *Kauderwelsch Band 216, Māori Wort für Wort*. ISBN 978-3-89416-325-9., germane

Vidu ankaŭ

Esperantigo de vortoj el maoria fonto

Eksteraj ligiloj

- Maoria-Esperanto-Maoria Vortaro de Brian Fox (http://eo.esperanto.org.nz/dictionaries)
- La maoria lingvo sur la retejo de « The Ethnologue» (http://www.ethnologue.com/show_language.asp?code=MRI)
- regionaj variantoj (http://www.wordiq.com/definition/Maori_language#Dialects)
- Kōrero Māori: parolu la maorian (http://www.korero.maori.nz/)
- Māori Language Commission (http://www.tetaurawhiri.govt.nz/)



Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Maoria_lingvo&oldid=6989496"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 19:18, 30 jun. 2020.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.